

vorto kaŭzo.

Nun faru la duan vorton: *aldona*. Vi povas vidi sur paĝo 10, ke la serĉata sinonimo de tiu vorto komenciĝas per *a*, kaj ke ĝi estas radiko. Ĉu vi povas diri la sinonimon? Iru al la sekva paĝo. Tie vi vidas la numeron 2 maldekstre kaj vi eklernas, ke sinonimo de *aldona* estas *akcesora*.

Nun vi povas fari la trian vorton *resono*. La sinonimo estas radiko kaj ĝi komenciĝas per la litero *e*. Turnu la paĝon, kaj vi vidas ke la sinonimo estas *eĥo*.

Daŭrigu. Sekvu la numerojn, kaj ĉiufoje turnu la paĝon por trovi la solvon. Iru ĝis la paĝo 40, kaj poste daŭrigu per la sekvanta numero sur paĝo 1. Entute vi faros 155 vortojn antaŭ ol vi faros la duan ekzamenon.

Kiel fari la Vortlernigilon inverse.

Komencu sur la paĝo 40 kun la vorto *armeo* (numero 31). Vi povas vidi, ke la sinonimo kiun vi serĉas komenciĝas per *m*, kaj ke tiu vorto havas *rss* strukturon, tio estas, ĝi havas radikon sekvatan de du sufiksoj. Nun iru al la antaŭa paĝo (39) kaj rigardi la vorton numero 31. Vi konstatas, ke sinonimo de *armeo* estas *militistaro*.

Nun iru al la vorto 30, *tangi*, kaj elpensu sinonimon kiu komenciĝas per *b*. Turnu al la paĝo 38 kaj vi trovas ke la sinonimo estas *balanciĝi*.

Vi povas fari la tutan libron kaj antaŭen kaj malantaŭen laŭplace. Farante la Vortlernigilo dudirekte helpas al vi pliprofundigi viajn konojn de esperantaj vortoj.